



BOLETIN

A B R I L
1 9 5 1RUZAFÁ, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

POCO A POCO...



El hecho trivial de que un notario castellano ejerza sus funciones en el país gallego, o que un maestro valenciano desempeñe su misión al pie del Moncayo, no nos extraña y hasta nos parece muy lógico, puesto que España es un estado, aunque heterogéneo en sus distintas regiones, suficientemente fundido por la historia y la religión, ya que no por el lenguaje o las costumbres. Pero ello no hubiese parecido tan natural hace unos cuantos siglos, cuando, aparte de que una gran porción de nuestra Patria estaba ocupada por los árabes, el resto de la península estaba dividido en diversos reinos, no siempre bien avenidos.

Pensar, entonces, que, salvo casos aislados, los escribanos leoneses fueran a establecerse en Barcelona, o que los marinos catalanes fueran a defender las costas vascas, hubiese sido considerado, con sobrado fundamento, como algo inconcebible, como un verdadero disparate..

Sin embargo, cinco siglos son muy poco, nada o casi nada, para el curso de la Historia.

El progreso moderno lleva una velocidad y un ritmo que no pueden controlarse fácilmente; en un solo día se inventan mil veces más cosas, aunque no todas sean buenas, que en todo un siglo de los de antaño. Lo que hoy parece una utopía, será considerado mañana, o pasado mañana, como una adquisición lógica e inevitable, y los escépticos de hoy serán considerados como unos perfectos cretinos por la masa humana del futuro.

Y lo que ocurre con las ciencias y las técnicas, es aplicable también a la manera de vivir y de relacionarse unos países con otros. Los países no pueden mantener por más tiempo su concepto aislacionista. Los hechos confirman, con su elocuencia incontrovertible, la marcha discontinua, pero inexorablemente progresiva, de la comunidad internacional.

Al terminar la última guerra, la imperiosa necesidad económica formó el Benelux. Hoy, el plan Schuman funde virtualmente los intereses económicos de seis naciones, que hasta ayer se miraban con recelo; la suprema razón de la supervivencia les obliga a unir su fortuna, en un ensayo de mancomunidad, huyendo del caótico desbarajuste aislacionista. ¿Quién lo hubiese predicho hace no más de quince años? ¿Quién lo hubiese pensado?

Los que conocen bien el tinglado administrativo de las Naciones Unidas, saben cuán profundo es el problema lingüístico que allí hay que resolver. La pluralidad de idiomas oficiales complica las cosas, las retarda, y, además, las encarece extraordinariamente.

Quien ahora diga que, a la vista de tan caótica situación, se impondrá en breve la implantación obligatoria del uso del Esperanto, es posible que tenga que sufrir los denuestos o burlas de las personas «sensatas» y realistas. Afortunadamente, cada vez son más los que creen necesaria y fatal la adopción del idioma auxiliar internacional. Y, como ocurrió con otras muchas cosas, los «ilusos» de hoy seremos los únicos que nos libremos del juicio conmiservativo de las generaciones del mañana, de ese mañana todavía incierto, pero que se vislumbra ya con un amplio concepto de la vida, y en el que se armonizarán los eternos valores espirituales con el uso práctico de todo aquello que demuestre ser útil y provechoso. Por eso, entonces, se burlarán de aquellos que teniendo a mano un salvavidas se empeñaron en ignorarlo, prefiriendo hundirse en el proceloso mar de la confusión y el desconcierto.



EL ESPERANTO EN EL TURISMO

Como índice del uso del Esperanto en la propaganda turística, damos a conocer los siguientes folletos últimamente editados por distintas asociaciones oficiales de iniciativas y viajes

ALEMANIA.—«Bavario», «Ferioj en Germanujo».

BELGICA.—«Spa kaj la Altaj Fanoj».

BULGARIA.—«La Bulgaraj Kavernoj»
«Banki» «Sveti Konstantin Varna».

HOLANDA.—«K. L. M. Reĝa Nederlanda Aertrafika Kompanio».

HUNGRIA.—«Hungario».

IRLANDA.—«Irlando - Informoj por vizitantoj».

ITALIA.—«Itala Turismo-Klubo».

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● INGLATERRA.—El drama *Otelo*, de Shakespeare, será representado en Esperanto durante el Congreso Escocés, que ha de celebrarse del 25 al 28 de mayo próximo.

● BELGICA.—En Bruselas (Konijnpenkeren, 19, Bosvoorde) funciona «Turista Servo Esperantista», que procura información turística a cuantos lo interesan de dicha oficina.

● FRANCIA.—Con motivo del Congreso de la «Federación Mundial de Ferrovianos Esperantistas» (16 al 22 de mayo) se está organizando un torneo internacional de ajedrez.

● El Alcalde de Lyon y Presidente de la Asamblea Nacional, señor Eduardo Herriot, ha aceptado la Presidencia de Honor del XLIII Congreso Francés de Esperanto.

En la Escuela Normal de Auteuil, ante sesenta futuros maestros franceses, pronunció una conferencia, en el pasado mes de enero, el señor Waringhien, con el tema «Interés del Esperanto para los educadores» que fue escuchado con grandísimo interés.

En Angers se ha rotulado una calle con el nombre de «Doctor Zamenhof».

● SUIZA.—La «Société Suisse de Radiodiffusion» (28, Neuengasse, Berne) emite periódicamente programas en Esperanto a cargo de los doctores Privat y Baur.

La «Comission Electrotechnique Internationale» (39, Route de Malagnon, Ginebra) ha editado *International Electrotechnical Vocabulary* en varios idiomas y también en Esperanto.

● ITALIA.—Con ocasión de la LIII FERIA Internacional de Verona, dedicada a la agricultura y ganadería (11 al 20 de marzo), se instaló un stand de propagación del Esperanto, llamando la atención de los visitantes la exposición de escritos, tarjetas y periódicos del mundo entero, recibido todo ello directamente por los esperantistas locales.

● BRASIL.—En Belo Horizonte y con motivo de haberse rotulado con el nombre de «Plaza Esperanto» una vía de aquella urbe, la Asociación Esperantista de Minas Gerais ha donado al Ayuntamiento un monumento al Doctor Zamenhof, que ha sido emplazado en el jardín de dicha plaza. Con tal motivo, se organizó un acto en pro de la lengua auxiliar, con participación de distinguidas y relevantes personalidades oficiales.

● GUATEMALA.—Gracias a la labor del doctor Jules Bonge, se está iniciando la difusión del Esperanto en este país americano. La emisora oficial «La Voz de Guatemala» radia todos los martes (23:45 a 24:00 horas —Greenwich—, por onda de 49 metros) un programa de la lengua auxiliar. Actualmente se están desarrollando cuatro cursillos para su enseñanza, uno de ellos en la Facultad de Humanidades de la ciudad de Guatemala, con amplia y entusiasta participación de jóvenes intelectuales de aquel país hermano.

● ARGENTINA.—El incansable deportista y entusiasta esperantista Tibor Sekelj, junto con dos esforzados compañeros, realizó con pleno éxito la difícil ascensión a la cumbre del Aconcagua (7.035 metros) en la cordillera de los Andes. Como recuerdo de su arriesgada hazaña, quedó en aquella imponente altura una bandera esperantista.

¡EL ESPERANTO ES UN PUENTE IDEAL ENTRE TODOS LOS PAISES!

La gran diferencia entre el Esperanto y un idioma extranjero es que el Esperanto, dentro de un país cualquiera, nunca puede ser considerado como extranjero porque, no siendo exclusivo de ningún pueblo, es tan propio para todos como el propio lenguaje de cada uno

HISPANA KRONIKO

KANARIAJ INSULOJ.—Post longa silento, kaŭzita de la ĉesigo de universitata Esperanto-Kurso en La Laguna, ĝoje ni povas informi nun, ke la 23^a de pasinta Februaro komenciĝis nova kurso ankaŭ en tiu universitata urbo de la kanaria insularo. Ĝi evoluigas en la biblioteka salono de Real Sociedad Económica de Amigos del País de Tenerife, plej malnova asocio en la arĥipelago, kun sidejo en La Laguna. La statutoj de la asocio ŝirmas la funkciadon de la kurso, kiun gvidas nia federaciano J. Régulo Pérez, antaŭa instruisto de Esperanto en la samurba universitato mem. La jara ĝenerala kunsido de tiu asocio, laŭ formal la peto de tri membroj de nia Federacio, decidis ĉiesvoĉe disponigi sian ejon por la kurso. Kun ties komenco, kiun ĉeestas kontentiga nombro da interesitoj, nova periodo malfermiĝas por nia movado en la bela insularo. Ni esperas kaj varme deziras, ke la klopodoj de la bona amikoj, kiuj tie postenas, estu sukcesaj kaj efike fruktodonaj.

BANAPÁ (Santa Isabel).—En tiu vilaĝo, apud la ĉefurbo de la Hispana Gvineo en malproksima angulo de Afriko, brilas nia stelo kiel frapanta atesto, ke la volo estas ofte pli forta ol la povo. Nia kara amiko, fervora samideano kaj sindona misiisto Felikso de Valois Arana ne multe ŝatas la privilegion esti sola esperantista izolulo en kolonia teritorio; tial profitante de la ŝancon, ke li estas profesoro de Supera Indiĝena Lernejo, li ĵus starigis Esperanto-Kurson, en la Indiĝena Seminario, kiu troviĝas en la supre dirita vilaĝo; 34 negraj seminarianoj, 16-30 jaraj, partoprenas la kurson. Ili ĉiuj sekvas, kun granda atento kaj intereso, la lecionojn de sia instruisto, kiu ne nur instruas al ili nian lingvon en la lernejo, sed ankaŭ ekstere, dum la promenadoj kaj amuztempo. Li ankaŭ obstine celas klarigi kurson en la Supera Indiĝena Lernejo de la ĉefurbo kaj eĉ revas pri Gvineo Esperanto Asocio...

Dank' al la klopodoj de nur unu sola fervorulo, vastaj perspektivoj malfermiĝas al nia movado en tiu fora angulo de la mondo. Ĉi tio estu modelo imitinda de tiuj samideanoj, kiuj estas izolitaj esperantistoj en similaj apartaj regionoj.

INTERLINGVA PARALELO

ORIGINALO

Mirinda estas la rilato inter lingvo kaj literaturo: La literaturo ĝermas kaj kreskas el la lingvo; kaj, inverse, la lingvo nutriĝas kaj kreskas pere de sia literaturo. La historio pruvas al ni, ke lingvoj, parolataj eĉ de malgrandaj nacioj, ne pereas eĉ malgraŭ kelkcentjara subpremado, se tiuj lingvoj havas literaturon, kiu, spirite nutrante la lingvon, konservas ĝin viva eĉ en la plej malfavoraj cirkonstancoj.

El skizo, de G. J. Degenkomp, kompetenta kaj konata nederlanda esperantisto, pri la evoluo de la lingva literaturo

TRADUKO

Maravillosa es la relación entre lenguaje y literatura: la literatura germina y crece del lenguaje; y, a la inversa, el lenguaje se nutre y crece por medio de su literatura. La historia nos prueba que lenguas habladas. Incluso por pequeñas naciones, no perecen, aun bajo una opresión de varios siglos, si esas lenguas tienen una literatura que, nutriendo espiritualmente al lenguaje, lo conserva vivo incluso en las más desfavorables circunstancias.

De un bosquejo de G. J. Degenkomp, competente y conocido esperantista holandés, sobre la evolución de la lengua literaria

KELKAJ VORTOJ ATENTINDAJ DE KOLEGOJ TRE FIDINDAJ...

...«Novelektitaj funkciuloj seniluziĝas, kiam ili spertas, ke, por la efektigo de la sopirata celo, mankas ne nur la mono, sed ankaŭ la tempo; ĉar ne forgesu, karaj gelegantoj, ke ili devas fari la organizan laboron dum la malmultaj horoj, kiujn la profesia laboro lasas liberaj. Regula aperigo de asocia organo, eĉ de simpla malgranda folio, postulas multon. Ofte, la redaktoro verkas sola, kolektas materialon, legas aliajn gazetojn, por havigi al la legantaro ion interesan kaj legindan. Kelkfoje okazas, ke la kompatingulo, krome, devas persone prizorgi eĉ la adresadon!...» *Nederlanda Esperantisto, kaj Svenska Esperanto-Tidningen jano:*

«Eldoni gazeton estas facila afero, se sufiĉa nombro da abonantoj pagas ĝustatempe siajn kotizojn. Sed redakti gazeton postulas multan laboron, eĉ de spertulo!...»

PROKLAMO

POR NIA UNUA LITERATURA KONKURSO

Al vi, kulturitaj verkistoj kaj inspiritaj poetoj, kiuj ĉie tra la mondo flegas kaj dorlotas, per la magio de via vervo, la kadenceojn plej subtilajn de la belega internacia lingvo, Hispana Esperanto-Federacio sendas sian girlandon el la koraj fervoraj salutoj, kaj ĝentile ĝi invitas vin rekte partopreni kaj honori, per la alta kontribuo de via talento, la literaturan feston, kiu — en la solena kadro de la 12^a Hispana Esperanto-Kongreso — okazos en la urbo Tarrasa, dum la lastaj tagoj de la venonta monato Julio, laŭ sekvo de jenaj reguloj:

ORDINARAJ TEMOJ

- 1.^a (Verso) Lirika poeziaĵo.
Kun libera elekto pri rimo kaj metriko
- 2.^a (Prozo) Mallonga novelo.
Kun libera elekto pri stilo kaj enhavo
- 3.^a Traduko el hispanlingva poeziaĵo.
Klasika au moderna
- 4.^a Traduko el hispanlingva proza fragmento.
Kun libera elekto pri temo kaj speco

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

Premioj de Hispana Esperanto-Federacio

- 400 [kvarcent] pesetojn por la plej adekvata Turisma Gvidlibro pri Hispanio, en konciza formo de kompendio.
- 300 [tricent] pesetojn por plej trafa artikolo, favore pledanta por Esperanto, kiu estos publikigata en kiu ajn revuo, gazeto aŭ ĵurnalo de la lando, dum la tuta daŭro de la du proksime venontaj monatoj Majo kaj Junio.

Sekvos pliaj temoj kaj premioj de aliaj diversaj institucioj

NOTOJ—La unua premio, por ĉiu el la kvar ordinaraĵoj, estos arĝenta tabuleto, sur arte tajlita kaj taŭge prilaborita ligno, kun gravurita nomo de la aŭtoro, krom la koncerna diplomo, kiun cetere ankaŭ ricevos ĉiuj postsekvaj premiitoj, tiel de la ordinaraĵoj, kiel de la eksterordinaraĵoj. Ĉiuj verkoj estu nepre originalaj kaj ankoraŭ ne senditaj al alia simila konkuro. La tradukojn devas akompani la originalo. Ĉiun materialon oni sendu, kun tre klara indiko pri nomo kaj adreso de ties aŭtoro, per rekomendita poŝto, ne pli malfrue ol la 15^a de Julio, al la ĝenerala adreso de la

Organiza Kongres - Komitato

San Francisco, 92.-TARRASA (Barcelono)

La pluvo de Aprilo estas beno por la kampoj. La spongeca grundo ricevas agrable kaj sorbas avida la sanktan aspergon de la daŭraj gutoj, kiuj fluas el pufa amasego de impona nimbuso, kvazaŭ lastaj larvoj de adiaŭa ploro. Forte, pro la efiko de tiu refreŝiga bano, la tero eligas siajn naturajn odorojn, kiel ateston de danka saluto al la nuboj, aŭ kiel signalon de averto konkreta por ili, ke jam la soifo estingiĝis... Tiam, la intima rilato, ekzistanta inter ĉielo kaj tero, fariĝas videbla al tiuj elektitaj personoj, kiuj ŝatas serene rigardi al la supro. Pluvas ankoraŭ; jes, ankoraŭ pluvas, sed pli dise, pli malpeze... En la griza maso de la nebula plafono, la obstina puŝo de varmetaj blovoj sukcesas bori kelkajn aperturojn, tra kiuj subite montriĝas helaj pecoj de lazuro, kaj eskapas ŝpruco de aroĝaj sunradioj, kiuj, sendifekte fendante la striojn el akvaj perletoj, iras renkonte al la malsupra supraĵo. La tero aspektas, pro la malsekeco, kiel multflanke rompita spegulo: folietoj kaj vulgaraĵoj ŝtonetoj transformiĝas en juveloj de mil variaj facetoj, ĉe la viva lumplena kareso de petola sunero.

La pluvo ĉesas, iom post iom; nun, anstataŭ mallarĝaj truoj, lazure bluas jam vastaj interspacoj en la volbo de la firmamento; kaj... ho! plene majeste, kvazaŭ fabela ponto, en fabela lando, de ekstremo al ekstremo de la horizonto, jen mirinda, jen belega, grandioza ĉielarko disvolvas la gajajn kolorojn de sia rubando. Rigardante la spektaklon, mi meditas kaj meditas; kaj multe mi ĝojas, finfine, antaŭ la konvinko, kiu nestas ĉe mi, ke eblas kontakto inter ĉiuj homoj, kiel tiu de ravanta ĉielarko, kiam, post printempa pluveto, ĝi povas etendi la brakojn, sen malica gesto nek aparta prefero, en ĉiujn direktojn, de nordo al sudo kaj de okcidento al oriento...

Kaj tial, ke mi statas nun sub la influo de meteorologiaĵaj figuroj, estu ankaŭ dirite, ke abunda pluvo da gazetoj — salutinda pluvo! — falis ĉi tiun monaton ĉirkaŭ mi. Nu, jam estas tempo dediĉi al ili adekvatan atenton, sen plua retoriko; ĉu ne?

La reprezentantoj de la malproksima Azio estu, hodiaŭ, la pioniroj en la vico: **ESPERANTA KATOLIKO** estas bonege redaktata broŝuro, trimonata organo de Katolika Asocio de Japanaj Esperantistoj. Pro lerta arango kaj trafaj elektita enhavo, kun utilaj informoj, ĝi estas valora kaliko da moralaj instruoj. **POR PLI BELA**

ESTONTO estas kuraĝe spitema folio de Esperantista Klubo en la Universitato de Tokio. OOMOTO, krom la kutimaj artikoloj pri la homama doktrino, pledas por la universalistaj movadoj kaj tute ne neglektas la prilingvajn komentojn; dank' al tiuspeca artikolo, oni scias, ke la japanoj uzas nur la vorton «naku» por esprimi ĉiujn blekmanierojn de insektoj, birdoj, kaj ceteraj bestoj. EL POPOLA ĈINIO estas grandformata monata eldonaĵo de ĉina fremdlingva oficejo. LA RONDO, malgranda kaj tamen riĉenhava organo de la aŭstraliaj geamikoj, en siaj lastaj numeroj atentigas tre funde la lingvajn problemojn; estas interesa la diskuto, inter du kompetentuloj, pri la konveneco aŭ malkonveneco de majuskloj. En alia artikolo, oni legas: «Iu sugestis, ke «onidiro» (komuna diro aŭ famo) logike rajtigas la uzon de «onitimo», «onikredo», «onisupo», k. a. se leviĝus neceso por tiaj formoj, kun la senco de ĝenerale sentata timo, kredo aŭ supozo. La analogeco ŝajnas klara, sed ĉu vere ĝi estas efektiva? Jam revene en Eŭropo, min salutis la bonkvalita papero -enviinda papero!- de skandinavaj gazetoj. SVENSKA ESPERANTO - TIDNINGEN ĉiam estas malavare garnita per multaj bildoj kaj vinjetoj; same kiel NORVEGA ESPERANTISTO, kiu, per belaj vidaĵoj, estas simpatia magnetito por delogi kaj tiri la okulojn en direkto al la ĉarma lando de la fjordoj. DIA REGNO estas sintezo de jenaj kvalitoj: luksa papero, arta aranĝo, interesa enhavo kaj tolerema spirito, akorde kun la psalmo, kiun mi represas: «La Eternulo estas bona por ĉiuj; Lia favorokoreco estas super ĉiuj kreitaĵoj». Nun LA BUDHA LUMO estas la nova titolo de «La Dharmo»; kun la sama beata fervoro, ĝi daŭras en la semado de saĝaj instruoj, kiuj efikas kiel balzamo sur la vundojn de la nuntempa socio. Jen denove inter ni, post eta paŭzo, MALGRANDA REVUO, la bona literatura eldonaĵo de la diligenta fervorulo Stellan Engholm. Aparte interesa estas, inter du gravaj raportoj, la artikolo: «Kelkaj konstatoj pri tradukado de poezio». Forte mi deziras, ke la plano por asecuri la daŭran aperon de sekvontaj ka-

jeroj estu sukcesa. NIA VOĈO raportas pri agado de la danaj laboristaj kluboj; en tiu de Kopenhago, estis amika debato pri la planlingvoj; tie oni «precizigis, ke tiu planlingvo, ĝis nun sukcesa, (Esperanto) estas kreita ne de profesia lingvisto, sed de humanisto». LA PONTO, kiel oficiala revuo de la germana asocio, entuziasme reklamas pri la Universala Kongreso en Munkeno; ĉu hispanoj ĝin vizitos? ho, kiu scias; kiu scias... ŜAKA HEROLDO estas ege kurioza kaj larĝe ilustrita folieto pri ŝako por fervojistoj kaj poŝtistoj. SEMISTO, informilo de Katolika Centro de Germanio, ne haltas en sia celado disvastigi nian lingvon tra la katolikaj medioj; kaj tion ĝi faras per taŭgaj rimedoj! En LA ĜUSTA VOJO, jam bone konata cirkulero, ankaŭ por katolikaj informoj; estas pensiga la fragmento el parolado de Kardinalo Faulhaber, kie oni legas: «La homo ne estas absoluta estro pri sia vivo; li estas nur administranto de sia vivo». En ĉi tiu populara cirkulero, mi rimarkas oftan tondadon de la finaĵeto «aŭ» en la vortoj «ankaŭ», «ankoraŭ» k. t. p. ili aperas sub la kripla formo de «anke», «ankore» k. t. p. Ĉar tio okazas nur en kelkaj artikoloj, kredeble tio estas privata prefero de aparta persono; sed, ĉu ne pli bone unuecigi la stilon kaj forigi tiujn etajn malglataĵojn en tiel simpatia kolego? ESPERANTO POST garnas sin per bela novelo «La Nekonatino» kaj ampleksa kolekto de poemoj, inter kiuj troviĝas tre ĉarma specimeno, tradukita de nia karmemora poeto Jaume Grau Casas. ESPERANTO-KURIER egalas en ĉarmo kaj sana aspekto al sia ĝemelo; inter lerta distribuo de arto, sprito kaj amuzo, nia lingvo pompas kaj prezentas perspektivojn je tio, kio povas esti tre popola kaj tamen altkvalita publikigaĵo, kiam financaj rimedoj ebligas aperigi similajn gazetojn, sed... kun multe, multe pli, da tiel belaj paĝoj!

Jes, jen denove svarmo da revoj supren flugetantaj, en direkto al la puraj koloroj de la serena ĉielarko, kiu, tra la vastega spaco de la eteraj regionoj, estas ponto ideala, de ekstremo al ekstremo de la foraj limoj, interne de kiuj, kun pensoj al vi, tute ne laciĝas revii

LA LEGEMA KOBOLDETO

INTER LA PROZO DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

SE NE VERO...

La karavano haltis en senarba loko de la jangalo.

—Jen, tie estas vilaĝo-kris la gvidanto.

La ses esploristoj antaŭeniris, sekvataj de sia negra eskorto.

Efektive, ducent metrojn malproksime troviĝis indiĝena vilaĝeto.

—Zorgul, avertis la gvidanto; multaj membroj el ĉi tieaj triboj estas kanibaloj.

Tiaj ili estis, efektive; sed tial ke la ekspedicio estis abunde armita kaj la tribo malmultenombra, apenaŭ kvin dekoj da familioj, nenio malagrabla okazis. La indiĝenojn kontentigis kelkaj specoj da sekigita viando, bareloj da brando kaj provizo da gajkoloraj ŝtofoj.

—Ĉu ni kunportu du el ĉi tiuj negroj en Londonon? demandis unu el la esploristoj. Ili ja ne ŝajnas dangeŝaj. Eble ili jam de longe forlasis la kanibalecon. Cetero, lerninte de nia civilizacio, ili povos siavice instrui siajn samlandanojn, kiam ili revenos.

—Ĉu vi kredas, ke ili konsentos veni?

—Mi kredas, ke jes. Ĉiukaze, ni demandu la tribestron!

Kaj tion ili faris. La tribestro respondis, ke laŭ la loka leĝo, oni devas konsulti la Maljunulan Konsilantaron.

—Tre bone, sed ni intencas foriri post tri tagoj.

—Nu, morgaŭ mem, certe vi ricevos la respondon.

Kaj la respondo estis jena:

—Du junuloj iros kun vi. Mi esperas ke ili estos tre bone traktataj kaj revenos akirinte multe da scio. Plej interese estas, ke ili lernu medicinon kaj la arton batali, kiel la blankuloj.

La ekspedicio formarsiis kun la du negroj; kaj, kelkajn semajnojn poste, ili ĉiuj alvenis en Londonon.

—Kie ni gastigu ilin?, demandis iu.

—Nu, mi havas vilaĝon en la kamparo, proksime de la urbo. Mi kredas, ke plej bone estos loĝigi ilin tie, ĝis ili alku-timigos al la nova medio.

—Bonega ideo!

Pasis tagoj kaj semajnoj. La negroj ŝajnis tre kontentaj pri sia nova vivo en la angla ĉefurbo. Iom post iom, ili ricevis pli da libereco; kaj fine, oni lasis ilin iri solaj, tra la stratoj de Londono.

Iun vesperon, unu el la ekspediciintoj faris viziton al ili kaj diris:

—Jen; mi deziras, ke morgaŭ vi venu kun mi al mia scienca klubo, ĉar mi deziras prui al miaj kolegoj, ke nur la medio naskas kanibalecon. Nur en la jangalo, kaj sub certaj kondiĉoj... Kaj pri alia afero, hieraŭ mi vidis vin en bona societo, kun du bonaspektaj sinjoroj. Kiuj ili estas?

—Ili estas... mangokamaradoj, respondis tute nature unu el la negroj.

—Ĉu... kio?

—Jes, ili estas najbaroj ĉe la sama tablo, ĉar ni plene transformiĝis kaj ĵus fariĝis klientoj en vegetarana restoracio...

La grilo, la cikado kaj la libelo estas la plej antikvaj insektoj. Oni trovis fosiliajn restaĵojn de ili en tavoloj formitaj dum epoko antaŭa al tiu de la grandegaj arbaroj. Tiu epoko, laŭ sciencaj deduktoj, antaŭas la homaron je dek milionoj da jaroj. La superaj insektoj: elegantaj papilioj, laboremaj abeloj, inteligentaj formikoj, aperis multajn jarcentojn pli poste. La grilo, kredeble, estas la unua viva estaĵo, kiu lasis sin aŭdi. Anstataŭ uzi la voĉon, kiu ankoraŭ ne ekzistis, ĝi frotis siajn elitrojn, dirante al la tiutempaj estaĵoj kapablaj ĝin aŭdi: Jen, mi estas ĉi tie!

La sonoj ankaŭ havas nuancojn, kiel la koloroj: unuj estas helaj, kaj aliaj malhelaj. La monotona kaj simpla krieto de la grilo estas griza, ĉar same griza estas ĝia inteligenteco. *Stultior gryllo!* Stulta kiel grilo! oni diris latine, antaŭ dumil jaroj. Kiel tipa reprezentanto de primitiva epoko, ĝi estas ekstreme naŭva; tial, ke ĝi ne kapablas eĉ plej etan ruzaĵon, ĝi timas eĉ plej etan dangecon. Ĝia sola defendo estas ĝia voĉo, kiu ne estas voĉo, sed meĥanika grincado. Ĉe la plej eta bruo, ĝi silentas por sin ŝirmi; ĝi aŭskultas momenton, kaj denove ĝi komencas la monotonan simfonion, kiu estas kvazaŭ la ĉho de la unua viva bleko, en ege malproksimaj epokoj...

LAKONISMO

Viro tre lakona sciis pri la forpaso de la edzo de konata sinjorino. Li skribis al ŝi unu leteron: «Estimata sinjorino: Ho, ve!»

Post unu jaro, li sciis, ke tiu sama sinjorino ĵus reedziniĝis; tiam jene li skribis denove: «Estimata sinjorino: Ho, ho!...»

Ricevitaj Libroj

ARIEL de José Enrique Rodó, tradukita el la hispanlingva originalo de Manuel Fernández Menéndez. Eldono de Urugvaja Esperanto-Societo. 20 x 12'5 cm. 137 p.

Tiu mondfama verko de plej elstara urugvaja literaturisto ĵus aperis esperantlingve, tradukita de la kompetenta samideano Manuel Fernández Menéndez, okaze de ĝia 50-jara jubileo. Vere, ĉi tiu juvelo de la sudamerika literaturo estos ĝojplene salutata de la tuta esperantista mondo!

Post la kolosa figuro de Ruben Darío, kredeble neniu alia hispanamerika verkisto honoris la lingvon de Cervantes tiel majstre, kiel Rodó. Filozofa, pedagoga kaj beletristo, la plej reliefa merito de Rodó estas lia instrua celo al la spirita plivalorigo de la tiam sudamerika junularo.

Ariel estas figuro kreita de Shakespeare, kiel simbolo de ĉiuj noblaj kaj moralaj fortoj de la homoj, kontraŭ la materiaj kaj brutaj inkliroj de Kaliban. Apud statuo de la heroo, profesoro Prospero lekcias antaŭ spiritoifanta junularo; kaj, kalejdoskope, el lia majstra menso fluas mirinde vivantaj preleĝoj pri la Vivo. Kiam finiĝas la lekcionoj, kaj dise foriras la juna aŭskultantaro, ĉiu leganto bedaŭras, ke la profesoro Prospero ne restas daŭre, kiel saĝa instruanto de la instruigema homaro.

Ĉi tiu verko, do, havis grandan sukceson; kaj ĝi estas larĝe konata per pluraj tradukoj. La esperanta kostumo estas bele fasonita de lerta kaj sperta posedanto de nia lingvo pri kies kapablo mi ne bezonas emfazi, ĉar li estas bone konata de la esperantista publiko. De nun, ni povas fieri pro la rekta posedo de tiu elstara verko, povante aserti, ke se la libro meritas plej inde la esperantan tradukon, la tradukinto estas digna komplemento de tiu merito. La bela simbolo de Ariel havas, por ni, la apartan kaj specialan signifon de ĉiuj delikataj sentoj kaj aspiroj de la esperantismo; tial, ĉio, kion instruas Prospero, aspektas al ni kvazaŭ la doktrino, kiun fervore instruis Zamenhof.

Reviziita de la Prezidanto de la Akademio, la libro, bele presita kaj zorge bindita, alportos en niajn bibliotekojn la freŝajn aromojn de la sudamerika kontinento.

Estu ĝi, do, varme akceptata!

R. HERRERO

ESPERANTU EN LA SOCIA SEKTURU

ALVOKO

INTERNACIA KOMISIONO
ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO

Sekretariejo:
Moerweg 76, Den Haag
NEDERLANDO

Dum la Universala Kongreso de Esperanto en Parizo 1950. en la sekcio Sciencoj kaj Teknikoj, estis proponita de kelkaj kongresanoj la efektivigo de sistema kontakto inter esperantistoj, kiuj laboras en la socia sektoro, t. e. personoj, kiuj estas profesie okupitaj kun sociaj aferoj en iu senco, science aŭ aplike. La sekcio akrame aprobis la esprimitan ideon.

Post la kongreso, la prepara laboro por realigi la intencitan kontakton komencis: komisiono formiĝis, kiu ellaboris projekton kaj kies unua tasko estas alvoki interesigantojn en la esperantistamondo por kune konsideri kaj krei bazon por pliaj eblecoj.

Ĉiun, kiu deziras kunlabori en la praktikado de la ideo «Esperanto en la socia sektoro» aŭ estas inklina doni sian helpon alimaniere, ekzemple per montrado de nura atento al la temo, ni invitas sendi nomon kaj adreson, kun mencio pri profesia funkcio, soci-sciencia, esplora aŭ aplika, al la sekretariejo de la komisiono.

INTERNACIA KOMISIONO
ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO

D-ro W. SOLZBACHER, prezidanto

C. J. KEUR, sekretario

FERIO POR INTERNACIA JUNULARO

Por 15-19 jaraj junuloj estas aranĝata, de la faka sekcio de Esperantistaj Instruistoj, ĉe Franca Esperantista Unuiĝo, 18-taga internacia migranta kolonio, de 17. Julio ĝis 4. Aŭgusto, ĉe okcidenta marbordo kaj kvar insuloj, inter Nantes kaj Bordeaux

Rezervita loko por 20 junuloj Esperanto-parolantaj

*Kosto: 8.000 frankoj entute
por gastigado kaj eksluosoj*

Ankaŭ vizito al Parizo: 4-6 Aŭgusto

URĜAS ALIĜI!

PETU DETALOJN AL

F-ino JEANNE DEDIEU

3, Rue Arzac

TOULOUSE (Francio)

36^a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

okazos nunjare en la kadro de la bela ĉefurbo de Bavario MÜNCHEN 4.-11 Aŭgusto 1951

Sendu vian aliĝon aŭ petu informon al

KONGRESA KOMITATO - Engelbertstr. 7 MÜNCHEN-PASING (Germanio)

☆ LA LERNEJO

PRILINGVA RUBRIKO

Pri la frazo «Ĝi estas utila kaj por vi kaj por ni» ni ricevis kelkajn klarigajn demandojn, ĉar oni ne komprenas kial estas uzata la unua «kaj». En tiu kazo oni devas kompreni, ke «ĝi» estas same utila por vi ol por ni, sendepende de tio, ke «vi» estas menciata unue ol «ni». Se oni diras, ke «Ĝi estas utila por vi kaj por ni» oni povas kompreni iom pli utila por vi ol por ni. Estas malgranda diferenco de nuanco, inter unu frazo kaj la alia. En hispana lingvo tiu unua «kaj» neniam estas uzata, tamen kontraŭe, en nea kazo, la mala vorto «nek» estas korekte uzata, kaj oni diras «Ĝi ne estas utila, nek por vi nek por ni» = No es útil ni para vosotros ni para nosotros.

JUAN BOSCH

Internacia Junular-Kunveno

Tuj post la Universala Kongreso en Munkeno, kunvenos junaj geesperantistoj el multaj landoj en la bavaraĵ Alpoj. Estos bela feria semajno, de la 11-a ĝis la 17-a de aŭgusto, ĉe la bordo de impona lago (Walchensee). En la junulargastejo Urfeld, la plej bela en Germanio, ni loĝos. En amika rondo ni banos, grimpos, migros, kantos kaj dancos, sed ankaŭ ni traktos pri niaj problemoj.

La diverseco de la programo garantiĝas, ke ĉiu partoprenanto trovos sufiĉe da altiraj aranĝoj. La kamaradeco inter la gejunuloj el ĉiuj landoj faros tiun renkontiĝon neforgesebla.

Venu, do, junaj geesperantistoj, kaj ne forgesu inviti viajn eksterlandajn gekorespondantojn! Vi estos bonvenaj!

Anoncu vin tuj!

ĉe Internacia Junular-Kunveno
MÜNCHEN-PASING Engelberstr. 7 (Germanio)

JUNAJ GEAMIKOJ! Ĉu vi scias, ke oni pretigas por vi gravan ferion? Ĝi estas alia INTERNACIA JUNULARKUNVENO en Haarlem urbo, kiu estas la gardeno de Nederlando. 26. Julio ĝis 2. Aŭgusto 1951. Zorgu jam aliĝi kaj partopreni! Ne hezitu!

Detu informilon kaj detalojn al

T. J. O. Centro en West-Graftdyk (Nederlando)

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatas al nia afero. Unu peseto aŭ unu r-k. validas por du vorto. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.

JOSE E. PEDRAZ, Marqués de Urquijo, 19, Madrid, deziras aĉeti ekzempleron de la numero de Decembro 1948. de la gazeto ESPERANTO de U. E. A.

— ATENTU!

Walter GIESELER en Berlin-Frohnau-Forstweg, 79 (Germanio) je nomo de 10 kursanoj (14-20-jaraj geknaboj) dez. kor. per bildkartoj kun afranko bildfranko.

D-ro DOI-MORIO, ginekologo en Kacho-Hospital (Gomen P. O. Zone) Nodamura, Kogaoka-gun, Kochi-ken (Japanio) dez. koresp. kun hispanaj kolegoj.

S-ro TADASHI INOUE - per sinjoro Sasaŭoki 1.º Higaŝi 3, HANNAN, ABENO-OŠAKA (Japanio) dez. korespondadi kun hispanaj amikoj pri diversaj temoj.

ONI AKCEPTAS SENKOSTE

Korespond-anoncojn de eksterlandaj gesamideoj. Por skribkostoj kaj absendo de provekzemplero, estas petata unu respondukupon.

ESPERANTO-KURIER

(16) OFFENBACH AM MAIN (Germanio)

AMIKO LEGANTO! — Memoru, ke ni bezonas vian opinion kaj viajn sugestojn. Mallongaj artikoloj estas tre plezure akceptataj por oportuna publikigo.

AVISO A LOS RADIOESCUCHAS

La emisión esperantista de Radio Roma ha sufrido algunas modificaciones. Su longitud de onda es actualmente: 25'20 m. 42'19 m. Los días de emisión son ahora los miércoles y viernes de 18'20 a 18'40. Téngase presente este cambio y anótese en la casilla correspondiente de nuestro número anterior.

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a ABRIL 1951)

	Suma anterior	419 Plas.
Ramón Molera (Moyá)	10	»
José Cuadras (Prat de Llobregat)	15	»
Rafael Vizcaino (Valencia)	10	»
Elsa Wolff (Santa Cruz de Tenerife)	15	»
Ernesto Roca (Tarrasa)	5	»
Francisco Calabuig (Valencia)	10	»
Ramón Molera (Moyá)	25	»
Manuel Ruiz (Grao de Castellón)	10	»
Total	519	»

No olvidemos que a esta sección siempre le van bien las vitaminas. ¡No descuidemos, pues, la dosis!

HEF-ANO: Helpu la eldonadon de nia Bulteno aĉetante kroman ekzempleron por via eksterlanda korespondanto. Unu ekzemplero, du pesetojn.